Budapeshto Januaro 2010
(Budapest, 2010. január)

En la haltejo de tramo,
en volbo de montrofenestro
li kushis sur la tero
inter siaj kartonoj, chifonoj
kaj malpuraj plastosaketoj.
Tra la polvkovrita vitro de monrofenestro
ekstazaj okuloj gapis
la eksteran mondon.
Regis vintro.
Akvoflakoj hardighis sur la trotuaron
kaj la vento kirlis rekirlis
ne frostigitan polvon de la strato.
Homoj preteriris lin rapide
ech ne rimarkis lin
en tiu lante helighanta
antautagmezo.

La chifon-, kaj kartonstako,
kiel la tero super la
surfacon atinganta talpo,
ekmovis.
La vivestajho sub ili
ekkunprenis siajn ajhojn.
Pligajighis la malgajaj hundoj
kurantaj sur la strato,
kaj plimultighis la kolomboj
serchantaj restajhojn
de strato kaj trotuaro.

Nova tago malfermis fenestron
al la mondo,
per malcertaj pashoj, en siaj chifonoj,
la malpurajn plastosaketojn surdorsen jhetante
ankau li ekiris,
novaj montrofenestroj atendis lin
kaj urinodoraj subpordegoj.

Tradukita de János Ruff